

La programita instruado de Esperanto en Svislando (2)
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 685, 1976.11.24 & 26 & 27

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Pasintan semajnon ni ekprezentis al vi raporton pri la apliko de la programita instruado al la planlingva instruado, kiun ni nuntempe prezentas en la Internacia Konferenco pri Interlingvistiko disvolviĝanta de la 24-a ĝis la 28-a de novembro en Paderborn. Ĝin organizis la Esplorcentro pri Kibernetika Pedagogio. Ni donis al vi la liston de la programitaj kursoj, kiujn Kultura Centro Esperantista funkciigis ekde la jaro 1970 kaj diris al vi, ke instruistoj formiĝas al la programita, aŭdvida kaj per drama instruado en la kadro de pedagogiaj seminarioj semajnfinaj aŭ feriaj. Se vi estas instruisto kaj deziras partopreni tiun ĉi aktivecon, vi petu informilon tra la kanalo de nia svisa Radio.

A.- Antaŭ ol detale priskribi niajn diversajn programitajn kursojn, ni sentas la bezonon diri en kia klimato ili naskiĝis.

Cl.- En mia verklaboro mi rimarkas tri periodojn, kiuj korespondas al mia persona aktiveco en la kadro de tri organizaĵoj:

- a) Esperanto-Junularo;
- b) Esperanto-Edukistaro de Svislando, kiu nuntempe renaskiĝis sub la nomo komisiono aŭ kampanjo Esperanto en la Lernejojn kaj fine:
- c) Kultura Centro Esperantista.

A.- Tuj ekde sia esperantiĝo en 1952 kaj ĝis 1958 mia edzo ludis gvidan rolon en Esperanto-Junularo de Svislando. La unuaj kontaktoj, kiujn li havis kun la esperanto-movado (Svisa Esperanto-Societo, ties junulara sekcio kaj la loka grupo Esperanto-Societo Neuchâtel) konvinkis lin, ke neniam esperanto progresos en tiaj malviglaĵaj kaj fermitaj medioj, kie la ĉefaj diskuttemoj estas movadecaj: kiun delegiton elekti, kiun kotizon ni akceptos pagi, kiun prezidanton sekvi, kiel ŝanĝi statutojn, ktp. Tial li tuj provis alporti novan etoson organizante en la kadro de Esperanto-Junularo de Svislando, kiun li remodlis, semajnfinajn renkontiĝojn, kie esperanto ĉesu esti celo por fariĝi kultura rimedo, kaj sportajn aranĝojn, sub la formo de migradoj en la montaro kaj skiferia restado en Adelboden, nun tradicia aranĝo. Tiuj ĉi semajnfinaj kaj feriaj kunvenoj estas la ĝermo de la aktuala aktiveco de Kultura Centro Esperantista. Ĉirkaŭ Esperanto-Junularo de Svislando ariĝis kreskanta nombro de junuloj kaj instruistoj, kiuj estis en daŭraj kontaktoj kun Edmond Privat kaj Pierre Bovet, pioniroj de la esperanto-instruado en Svislando.

Cl.- En tiu ĉi periodo inter 1952 kaj 1958 mi jam havis la okazon eksperimente instrui esperanton en la lernejo. Por mia finstuda instruista tezlaboro mi devis pritrakti la temon 'Interlerneja korespondado helpe de Esperanto'. Rezultis el tiu ĉi verko interalie Instru-programo bazita sur la legolibreto 'Esperanto por infanoj' de G. Gladstone Solomon. Tiun ĉi Instru-programo Esperanto-Edukistaro de Svislando eldonis en 1958. Dum pluraj jaroj ĉiuj provoj eksperimente instrui esperanton en elementaj lernejoj baziĝis sur tiu ĉi instru-programo, kiu fariĝis kunlaborfundamento komuna al la esperanto-instruistoj.

A.- Tiu ĉi malkovro de la graveco de komuna kunlaborfundamento kondukis mian edzon pli kaj pli precize difini sian poresperantan aktivecon en laborplanoj, kiujn li poste submetis por ekzameno al siaj kunlaborantoj. Tiel li ekzemple agadis en la kadro de Esperanto-Edukistaro de Svislando inter 1958 kaj 1968 kaj ekde 1968 en la kadro de Kultura Centro Esperantista.

Cl.- Dum pluraj jaroj la lernejo de nia vilaĝo La Sagne estis metita je la dispono de Esperanto-Edukistaro de Svislando por povi organizi pedagogiajn kunvenojn semajnfinajn. Tiuj ĉi aranĝoj ofte arigis ĝis 15 aŭ 20 kunlaboremajn gekolegojn aŭ helpemajn esperantistojn. Ili venis plenumi praktikan laboron dum la duono de la tempo kaj ni dediĉis la reston al diskutoj ĝenerale pedagogiaj, literaturaj, artaj aŭ al sportaj kaj migradaj okupoj. La partoprenantoj tranoktis en la klasĉambroj sur aermatracoj.

A.- Dum tiuj ĉi laborrenkontiĝoj kalkuliĝis ekzemple la listo de la monemoj plej oftaj en esperanto-tekstoj kaj en esperanto-konversacioj. Por tiu ĉi statistikado ni elektis legaĵojn uzeblajn en elementaj kursoj kaj gazetartikolojn legeblajn de komencantoj. Tiu ĉi Provizora fundamenta radikaro por la programita kurso enhavas 1257 monemojn. Ĝi montriĝis tre sekura kaj kontentiga instrumento kaj ludas la rolon de komuna fundamento vortara por ĉiuj niaj elementaj kursoj programitaj, aŭd-vidaj, perdramaj, ktp.

Cl.- Tiun ĉi liston ni komparis kun la tiam ekzistantaj en esperanto kaj la franca lingvo.

A.- Ankaŭ dum tiuj ĉi pedagogiaj renkontiĝoj ni havis la okazon testi kaj diskuti la unuajn provojn programi la instruadon de esperanto.

Cl.- Ni tuj rimarkis, ke la programita kaj aŭd-vida instruado de planlingvo kiel esperanto devas nepre emancipiĝi de la influo de la kursoj ekzistantaj por la naciaj lingvoj, interalie por la instruado de la franca, germana kaj rusa lingvoj. En esperanto la asimilado disvolviĝas laŭ aliaj ritmoj, ol en la ceteraj lingvoj pro la reguleco de la vortformado kaj simpleco de la skribado. Tial niaj programitaj kursoj malsimilas al la nacilingvaj.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!